

## SED TIAM

Ne amu min tiam,  
kiam

printempo alvenas kaj suno belas  
kaj belo ŝprucas kaj birdoj krucas  
nian vojon  
sin kisantaj,  
ĝoje mallantaj,  
enamiĝintaj.  
Kia feliĉo! Kiam en bobelo ni ŝvebas  
de amo pura, de amo nura  
kaj problemoj ne ekzistas, eĉ ne estas.  
Kiam mi rigardas vin kaj sentas  
la universon en paco.  
Kiam mi afablas, simpatias,  
mia suna flanko elradias.  
Kiam miaj cirkonstancoj  
enordas  
kaj mi feliĉas kaj satas.  
Kiam estas mi  
papili'  
gajflirtanta en aero...<sup>1</sup>  
Kiam tago brile helas  
kaj en buŝo dolĉmielas,  
dum mi gajas en intim'.  
Kiam birdoj kantas, saltas  
kaj la koro batekzaltas,  
ĉar mi ree vidos vin!  
Kiam  
la vivo ĝustas.

Ne tiam amu min.

Sed tiam,

kiam puso elfluas el la buŝo,  
kiam kiso al ĉi vizaĝ' ŝvela  
naŭzas, kiel ĉe leprul' kunkuŝo.  
Kiam falas kaskoj, falas maskoj  
kaj rikanas senmensoga vero,  
povra vero, nuda vero...

Kiam dentoj grincas, kiam saĝo mincas  
kaj pro sango ne videblas lango.  
Kiam helpon mi bezonas  
por superi la penon vivi.  
Kiam mi abomenas  
la ĉenon  
kaj ĝin ne volas pluigi.<sup>2</sup>  
Kiam abismo ekzistas  
kaj ĝia fundo proksimas  
(ne esploru  
kavernojn de l' animo).<sup>3</sup>  
Kiam mi ne plu eltenas,  
kiam amikino mia dolĉa  
min obsedas...<sup>4</sup>  
Kiam fantomoj de l' pasinto  
ne estas de l' pasinto.  
    Kiam vomo, stertoro  
    ĉeestas,  
    kiam ratoj  
    amikemas,  
    kiam brutalo  
    malfremdas.  
    Kiam kerno de l' bestio  
    aperas.  
        Kiam vivo estas  
        viva.  
        Kiam vivo estas,  
        kia ĝi estas.  
        Kiam vivo sin montras,  
        kia ĝi estas.

Tiam amu min.

- 
- <sup>1</sup> Aludo al la poemo *Papilio* de la rusa poeto Eŭgeno Miĥalski (1897-1937). Liaj versoj tekstas: “Estas mi / papili’ / gajflirtanta en aero, / dancas mi, / ĝojas mi / tutan tempon dum somero”.
- <sup>2</sup> Aludo al la verko *La infana raso* de la skota poeto William Auld (1924-2006). La “ĉeno”, kiel konantoj de *La infana raso* scias, estas la sinsekvo de la homoj el la pratempo ĝis nun, kaj plu. Klaras do la signifoj de “abomeni la ĉenon” kaj “ĝin ne voli pluigi”.
- <sup>3</sup> Denova aludo al William Auld. La versoj de Auld tekstas: “De malantaŭe / kroĉmane tiris timo / manikon mian / kaj flustris: / ‘Ne esploru / kavernojn de l’ animo””. La aŭtoro de la nuna poemo trovis tiujn versojn – kiujn li citas laŭmemore – antaŭ multaj jaroj en la lernolibro por hispanlingvanoj *Nuevo método de Esperanto*. Li ne scias, de kiu verko de Auld devenas tiuj versoj, aŭ ĉu ili konsistigas memstaran poemeton.
- <sup>4</sup> Aludo al la eksterordinara poemo *Amikino mia dolĉa* de la italo Aldo de’ Giorgi (1924-2003), aperinta en la verko *Pretertempe*. En la poemo De’ Giorgi parolas pri tiu sia amikino, kiu estas lia “kara vivinstigo” kaj “akompanantin’ fidela” de ĉiuj penoj liaj. La nura prezenco de la amikino helpis lin superi multnombrajn obstaklojn, kaj la konstanta memorado pri la amikino daŭre helpis lin elteni sian desperon kaj seniluziigojn. En si mem nenio eksterordinara, nura dankopoemo respegulanta ordinare romantikan situacion. Nur, tiu amikino estas – lia revolvero.

© *la tuta homaro. Ĉiu ajn rajtas represi la poemon aŭ traduki ĝin kaj publikigi en iu ajn lingvo ajnmaniere. Vi ne bezonas peti permeson de la aŭtoro nek atentigi lin – ja la aŭtoro ĉi-pere rajtigas la homaron pri kopio. La ĉi-suprajn klarigojn pri kelkaj aludoj en la teksto vi povas laŭplaĉe kunaperigi aŭ ne.*